



# Les obres d'Auzias March

Ausiàs March

**La ventoj kaj velaro plenumos miajn celojn**

XLVI

La ventoj kaj velaro plenumos miajn celojn,  
irante dubajn ondojn, plugante vojojn mare;  
sirok' kaj orienta kunblovos solidare  
kun suddevena vento kaj greka sur la velojn.

Mistral' kaj okcidenta armiĝas kontraŭsturme:  
fervore mi petegas al vento la transmonta,  
ke ĝia blovo estu al ili kunhelponta  
kaj jen kvinope ĉiuj venigu min returne.

La maro ŝaŭme bolos, kiel kaldrono forne,  
kun ŝanĝo de l' koloro kaj de l' natura stato,  
videble ĝi rigardos kun spito kaj malŝato,  
se iu ajn afero surfacas malgraŭŝtorme.

Por ŝirmi sin, la etaj kaj grandaj fiŝoj kuros,  
kaj ĉiuj haste serĉos sekretan kaŝiĝejon:  
lasante maron fuĝe, vivnutran akuŝejon,  
sur seka tero ili, verŝajne, pli sekuros.

La pilgrimuloj, ope, plej sanktajn votojn ĵuros,  
kaj ĉiuj ekpromesos abundajn vaks-modlaĵojn,  
pro la teruro ili laŭtigos sekretaĵojn,  
kiaj en konfespreno neniam eĉ susuros.

Vi mem, dum la danĝero, ne falos el memoro,

sed ĵure mi promesos al nin liginta Dio,  
ke mia firma volo ne malkreskos ĉe tio  
kaj ĉiam vi prezencos interne de la koro.

Timigas min la morto pro mia dista foro,  
ĉar fine jam la amo per morto neniigōs,  
sed mia bonvolemo neniel superigōs,  
mi kredas plenkonvinke, per ties ĉi rigoro.  
Mi sentas ekĵaluzon pri via vol' avara:  
ĉar ĝi post mia morto min eble tuj forgesos  
-dum ni ĉi-tempe vivas, verŝajne ĝi ne ĉesos-,  
mondĝuon jam forrabas ĉi tiu pens' amara:

post mia morto, eble, pri am' vi estos bara,  
tuj abomenindaĵo mi iĝos por vi blinde.  
Trudite ekster mondon, por mi ekestos pinte  
mia plej granda miso - ne vidi vin najbara.  
Kial, ho Dio, kial la am' neniam plenas,  
ĉar apud la pleneco nur sole mi min trovus?  
Kiome via volo min amas, mi scipovus,  
ĉar mi je la venonto ekfidus kaj timtremas.

Mi estas la amanto, kiu pleje ekstremas,  
post kiuj en la morto nun jam definitivas;  
aflikton mia koro ne montras, ĉar mi vivas,  
samkiom en la morto, kiu veegon ĝemas.  
Mi pretas al ambono kaj miso tutsimile,  
sed pro mia fatalo pludaŭras ŝancomanko;

en plena vekiteco, kun pordo sen ferstango,  
ĝi trovos min tutpretan, kaj jesos mi humile.

Mi deziregas, kio dronigus min elspile,  
kaj tiu ĉi espero el misoj min konsolas;  
ke mia nuna vivo liberu mi ne volas,  
el la plej kruda ŝanco, sed tuju ĝi azile.  
Kaj tiam la popolo rimarkos, mi admonas,  
kion la vera amo ekster mi mem plenumos,  
ĝia potenco rekte kaj evidente lumos,  
kaj miaj faroj pruvos la vortojn kiuj sonas.

Ho amo, amo, pri vi mi sentas pli ol konas,  
el kio restos sole la plej malbona parto,  
kaj vin ekkonas homo, se mankas via varto:  
al la ĵetkuba ludo mi vin kompare zonas.

Traduit per Abel Montagut